

# La Espero

2006:4



## Varbado por Esperanto en Helsingborg

La 11-an de junio, ege varma kaj sunbrila dimanĉo, pli ol 100 societoj, organizaĵoj kaj aliaj instancoj diskonigis siajn agadojn en la granda sportejo Heden en suda Helsingborg. En buĉoj, tendoj kaj konteneroj, sur scenegoj kaj gazonoj, estis prezentataj muziko, dancoj, ludoj, ekspozicioj ... Laponoj, indianoj, afrikanoj ... Helsingborg estas multkultura urbo.

Klubo Esperantista de Helsingborgo partoprenis per disdonado de informfolioj kaj ekspozicio de libroj kaj broŝuroj.

Legu ankaŭ pri aliaj aktivadoj por Esperanto en Helsingborg en tiu ĉi numero de La Espero.

*Foto: Ann-Louise Åkerlund*



## 91-a Universala Kongreso kun 2209 partoprenantoj

La Universalaj Kongresoj de Esperanto estas la plej granda ĉiujara manifestacio de la esperantistaro. Ĉi-jare la 91-a UK okazis en Florenco en Italio. Legu pli pri la kongreso en tiu ĉi numero de La Espero.

*Pejzaĝo de Florenco. Foto: Vikipedio.*

Organ för Svenska Esperantoförbundet

ISSN 0014-0694  
 Septembro 2006 • 94-a jarkolekto  
 Fondita en 1913

Redaktion: Leif Nordenstorm

Frågor om prenumeration o. dyl.:  
 Esperanto-Centro, Vikingagatan 24,  
 113 42 Stockholm, tel. 08-34 08 00

E-post: [esperanto@globalnet.net](mailto:esperanto@globalnet.net)

Ansvarig utgivare: Leif Nordenstorm

Utformning: Omnibus Typografi & Leif Nordenstorm

Tryck: Al-fab-eto, Skövde

Prenumeration 2006: 200 kr.  
 Prenumerationsavgift för *La Espero* ingår i medlems-  
 avgiften. Postgiro 20 12-3, Esperantoförbundet.

## ESPERANTOFÖRBUNDET

Adress: Esperanto-Centro,  
 Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm,  
 tel. 08-34 08 00

E-post: [sef@esperanto.se](mailto:sef@esperanto.se)  
 Nätsida: [www.esperanto.se](http://www.esperanto.se)

Öppettider: Esperanto-Centro har flexibla öppettider  
 dagtid. Ring i förväg!

Postgiro: 20 12-3, Esperantoförbundet

Medlemsavgift 2006:  
 Direktansluten medlem 200 kr.  
 Ungdomsmedlem (max 20 år) 100 kr. Medlemmar un-  
 der 30 år är samtidigt medlemmar i SEJU, Sveriges Espe-  
 rantisters Ungdomsförbund.  
 Hel familj 300 kr (inklusive ett exemplar av *La Espero*.  
 Tilläggsexemplar kostar 100 kr/år).

## ESPERANTOFÖRLAGET

Adress: Masthuggsliden 1, 413 18 Göteborg

Telefon: P.g.a. flytt ingen just nu. Vi återkommer.

Postgiro: 578-5

Nätsida: [www.algonet.se/~eldona/](http://www.algonet.se/~eldona/)

Telefontid: Vi återkommer med uppgift om detta.  
 Skriftliga beställningar expedieras under hela året.

Styrelsens ordförande: Anita Dagmarsdotter

### Manus till *La Espero*

sänds till Leif Nordenstorm, Järnvägsgränd 11  
 961 76 Boden, tel. 0921-123 54

e-post: [nordenstorm@globalnet.net](mailto:nordenstorm@globalnet.net)

När kommer *La Espero* 2006 och 2007

	Stoppdatum	Utkommer senast
Nr 1	15 januari	15 februari
Nr 2	28 februari	30 mars
Nr 3	30 april	31 maj
Nr 4	15 augusti	15 september
Nr 5	30 september	31 oktober
Nr 6	31 oktober	30 november

Utgivningsplanen är preliminär. Den som har bråd-  
 skande information som måste komma ut senast ett visst  
 datum bör ta kontakt med redaktören i god tid innan.

# Olof Nordenstorm



*Kie vi naskiĝis kaj kie vi loĝas?*  
 Mi naskiĝis en Boden en Svedio. Mi  
 loĝas en Järnvägsgränd. Mi havas ses  
 jarojn.

*Kie vi estas dumtage?*  
 Mi estis en infanejo (daghem) ĝis la  
 printempo. Mi estos en prepara lerne-  
 jo (sexårsgrupp) ekde la aŭtuno.

*Kiujn interesojn vi havas krom Espe-  
 ranto?*

Mi ŝatas konstrui robotojn, televi-  
 dedi, desegni, ludi komputilajn ludojn kaj  
 vidi filmojn. Mi ŝatas vidi la filmon pri  
 Mazi kaj Korvaks en Esperanto.

*Ĉu vi havas familion?*

Mi havas tri fratojn, fratinojn, panjon  
 kaj paĉjon.

*De kiam vi interesiĝas pri Esperanto?*  
 Paĉjo instruis al mi, ekde kiam mi es-  
 tis bebo. Mi komprenas multe, sed  
 parolas nur malmulte. Mi parolas nur  
 kun paĉjo, sed iam ni havas gastojn el  
 aliaj landoj.

*Kiuj estas viaj preferataj libroj en Espe-  
 ranto?*

La libroj pri Plupo, "La knabino, kiu ne  
 volis iri al infanejo" kaj "Esperanto  
 por infanoj".

*Ĉu ekzistas aliaj interesaj pri vi?*  
 Mi ne volas diri tion.

Intervjuis svede kaj esperante:  
**Leif Nordenstorm**

### Estimataj samideanoj!

La somero pasis. Hieraŭ miaj infanoj komencis la lernejan jaron, kaj lokaj  
 Esperanto-aranĝoj komencas okazi, anstataŭ la grandaj someraj.  
 Denove mi prezentas viron ĉi-supre sub la rubriko "Ni prezentas", nur  
 malgrandan knabon, sed tamen virseksulon.

Tio ne estas la rezulto de ia diskriminacio, sed mi fakte rimarkis ke ĝis nun  
 ĉiuj viroj, de kiuj mi petis intervjuon jesis tion. La plej multaj virinoj, de  
 kiuj mi petis intervjuon neis. Ĉu hazarda koincido? Aŭ ĉu multaj virinoj  
 ne volas "fanfaroni" pri si mem? Mi ne scias. Mi respektas la neantojn,  
 sed mi petas virinajn esperantistojn, kiuj volas intervjuigi por tiu ĉi paĝo  
 proponi sin mem al mi.

Cetere mi volas danki al vi, ĉar multaj el vi sendas materialon por *La  
 Espero*. Pro tio mia laboro kiel redaktoro ne estas tre malfacila.  
 Mi deziras al vi agrablajn aŭtunon kaj legadon.

Via redaktoro

# Ankoraŭ iom pri la kongreso en Malmö

## NI KOREKTAS

En La Espero 2006:3, p. 3 estis eraro pri Valdemar Langlet fine de la 2a kaj komence de la 3a kolumnoj. Legu:

... kreis klubon en Uppsala kaj estis la unua prezidanto en La Sveda Esperanto Federacio (tiam Societo)

Li fariĝis prezidanto de la Upsala klubo post kelkaj monatoj.

*En La Espero 2006:3 vi povis legi raporton pri la jubilea Sveda Esperanto-Kongreso en Malmö. En tiu ĉi revuo vi povas legi pri la jarkunveno mem.*

## Jarraporto

En la jarraporto de Sveda Esperanto-Federacio oni povas legi i.a. ke je la fino de 2005 SEF havis 499 membrojn. Pluraj homoj estas membroj de Esperanto-klubo, sed bedaŭrinde ne de SEF. Pozitivaj evoluoj oni rimarkis i.a. en Ludvika kaj Härnösand. La laste menciita ekhavis klubon en 2006.

Esperanto-Centro estas la "fenestro al la mondo" de SEF. Membroj, kiuj estas en Stokholmo, estas kore bonvenaj telefoni al EC, kaj oni klopodos organizi ke EC estos malfermita.

Dank' al volontuloj ĝi havas ankaŭ regulajn malfermhorojn.

En la ekonomia parto de la jarraporto oni povas legi ke la gajno de 2005 estis 16636 kronoj.

## Jarkunveno

Post la elektoj la estraro konsistis el: Bengt-Olof Åradsson (prezidanto), Wim Posthuma, Bengt Nordlöf (novelektita), Beatrix Svenonius Strid (novelektita), Martin Strid, Roland Lindblom (anstataŭanto) kaj Leif Nordenstorm (anstataŭanto).

## Proponoj

Al la jarkunveno alvenis diversaj proponoj de Esperanto en Väsby. La klubo proponis ke la membroj ricevu la jarraporton. La kunveno decidis ke oni publikigos informojn pri la jarkunveno en La Espero.

Alia propono temis pri tio ke la jarraportoj devas alveni en ĝusta tempo. La estraro samopinii pri tio kaj bedaŭris la ĉi-jaran malfruigon. Pri tio oni opiniis ne necese formale decidi pri la propono.

Tria propono temis pri tio ke la estraro devas informi al la membraro pri la diversaj fondusoj de SEF. Oni decidis ke estraro estonte informos pri ili en La Espero.

## Novaj klubo kaj retpaĝo

Roland Lindblom raportis ke oni unu semajnon pli frue fondis novan klubon en Härnösand. Ĝojiga informo!

Ulla Luin raportis ke oni nu laboras pri renovigo de la retpaĝoj de SEF. La ideo estas ke la tekniko devas esti simpla, kaj pluraj homoj respondecu pri la retpaĝoj.

## Novaj libro kaj gazeto

Bengt-Olof Åradsson rakontis ke SEF okaze de sia 100-jariĝo eldonis la libron "Eduko danĝera kaj aliaj teatraĵoj" de Harold Brown. (Vidu p. 8.)

Nova informgazeto nomiĝas "Språket Esperanto". Pri ĝi rakontis Kaisa Hansen. Ĝi celas esti informgazeto, kiu informas pri Esperanto al neesperantistoj. Oni povas mendi specialan numeron, se oni bezonas

specialan informilon por iu aparta okazaĵo.

## Nova kongreso kaj lingva tago

Bengt Nordlöf invitis al jarkongreso en 2007 en EsperantoDomo en Lesjöfors.

Bengt Olof Åradsson informis ke SEF partoprenos en Eŭropa Lingvotago en Stokholmo.


## Novajĝoj!

*La frakseno Igdrasil*  
ANTIKVA DIA HISTORIO



Alf Henrikson & Edward Lindahl

La Frakseno Igdrasil. 200 SEK.



Astrid Lindgrén  
**Mio, mia filo**

Tradukita de Esperantisto:  
Leif Nordenstorm

Eldona Societo Esperanto

Mio, mia filo. 125 SEK.  
Mendu ĉe [www.algonet.se/~eldona](http://www.algonet.se/~eldona)  
aŭ per la adreso sur paĝo 2.  
**Eldona Societo Esperanto**

## SVEDA ESPERANTO-INSTITUTO

invitas al du-taga seminario en Karlskoga Popola Altlernejo la 7-an ĝis la 8-a de oktobro 2006. (Eblas alveni jam vendrede.)

Temo: Informado, instruado kaj utiligado de esperanto

Programo:

Vendrede 19.00 Interkona vespero, Lars Forsman mallonge rakontas pri la lernejo. Kim Henriksen ludas, kafo/teo kaj buterpano

Sabate 9 - 10 Kafo/teo en la manĝejo. 10-11.30

Radojica Petroviĉ: Aktualaj tendencoj en pedagogio, instru- kaj lerneteknologio kaj instrumentodiko de lingvoj. 12 - 13 Lunĉo 13-14.30 SEI jarkunveno, kvizopromenado 14.30-15 Kafo/teo

15-16.30 Håkan Lundberg: Informoj pri Nitobe - lingva diverseco kaj demokratio. Politikaj aspektoj de lingvo kaj komunikado. 17 - 18 Vespermanĝo 19.00 - Distraĵoj en la kafejo kun inter alie Kim Henriksen.

Dimanĉe 8 - 9 Matenmanĝo. 9-10.30 Radojica Petroviĉ: Sukcesfaktoroj en esperanto-instruado. Modernigo de la internaciaj ekzamenoj de ILEI/UEA. 10.30-11 Paŭzo. 11-12.30 Sonja Petroviĉ-Lundberg: la esperantista junulara unuiĝo kaj ĝia laboro por esperanto. Nova versio de lernu.net. 12.30-13.30 Lunĉo.

Kotizoj: en unu-lita ĉambro SEK 1 700; en dulita ĉambro SEK 1 600.

La prezo inkluzivas konferenckotizon, unu tranoktadon kaj manĝadon laŭ la programo. La ĉambroj havas proprajn necesejon kaj duŝejon.

Por aldone SEK 150 vi povos alveni jam vendrede. Tiu prezo inkluzivas tranoktadon kaj vesperan sanviĉon.

Aligo: pagu al plusĝirkonto 5 15 11-4 plej laste la 29-an de septembro.

## Bunta aktiveco en Helsingborgo

### Prelegis Bertil Nilsson

Sabaton la 13-an de majo 2006 Bertil Nilsson prelegis en la urba biblioteko de Helsingborg. La temo estis: Esperanto – vilken var tanken och vad blev det? La biblioteko bele anoncis la eventon en sia programbroŝuro kaj per afiŝoj, tamen venis nur kelkaj interesatoj – plejparte esperantistoj.

### La esperanta flago flirtis

Dum du monatoj – junio kaj julio 2006 – la esperanta flago estis videbla en la haveno de Råå, apud Helsingborg. Pluraj personoj demandis en la restoracio pri la flago, kaj ricevis informbroŝuron pri Esperanto. Bedaŭrinde la flago jam disŝirigis pro la forta vento, kaj devis esti forprenita.



### Prezentado de kulturo

La 11-an de junio, ege varma kaj sunbrila dimanĉo, pli ol 100 societoj, organizaĵoj kaj aliaj instancoj diskonigis siajn agadojn en la granda sportejo Heden en suda Helsingborg. En budoj, tendoj kaj konteneroj, sur scenejoj kaj gazonoj, estis prezentataj muziko, dancoj, ludoj, ekspozicioj ... Laponoj, indianoj, afrikanoj ... Helsingborg estas multkultura urbo.

Klubo Esperantista de Helsingborg partoprenis per disdonado de informfolioj kaj ekspozicio de libroj kaj broŝuroj.

### Esperanto en lernejo

Komence de majo Barbro Haraldsson havis la eblecon informi pri esperanto en la lernejo 'Kristerssons' en Helsingborg. La lernejo havis 'lingvan tagon'.

Kiam reprezentanto de la lernejo vokis kaj demandis, ĉu iu povas veni al la lernejo, ŝi eksciis ke estos 50 ler-

nantoj - "kunmetitaj grupoj de ses, sep kaj ok". Ŝi preparis sin por lernantoj de la klasoj ses, sep kaj ok, sed montriĝis ke temis pri ses-, sep- kaj okjaruloj!

Ŝi do desegnigis, parolis pri substantivoj kaj sufiksoj, kaj donis al ili kopiojn de la unua paĝo de *Liza kaj Paŭlo* kun sveda traduko. "Espereble en la vespero la infanoj instruis iliajn gepatrojn kaj gefratojn pri Esperanto, ĉar ili scias ion, kiu estas tute stranga por la aliaj familianoj. Eble ili ekbruligis fajron ..." estas la dezirpenso de Barbro.

Ann-Louise Åkerlund

## Föredrag på Gotland

I gamla Enciklopedio de Esperanto, artikeln "Svedujo", nämns en esperantolärare i Visby och två i Ljugarn, och i gamla UEA-årsböcker kan man finna en och annan delegat på ön; därutöver finna inte mycket att säga om Esperanto på Gotland.

Sveda Esperantista Laborista Asocio (Svenska Arbetersperantoförbundet) fick dock i maj en förfrågan från arrangörerna av Alternativa Politikerveckan i Visby (som hölls samtidigt med Almedalsveckan, men på ett högre plan, åtminstone mätt i meter över havet - på högplatån öster om ringmuren) om vi kunde skicka över ett par personer och hålla ett föredrag om esperanto. Det blev två.

Fredagen 7 juli höll Gunnar Gällmo ett föredrag om esperantorörelsens och arbetaresperantismens historia. Sex åhörare (det krockade med annat föredrag), men ingen somnade och frågestunden blev rätt livlig.

Lördagen 8 juli var det Pelle Persons tur. Han hade gjort en svensk översättning av en esperantospråkig artikel av den gamle veteranen Eduardo Vilancos om spanska revolutionen 1936 och läste nu upp den. Betydligt fler åhörare, som satt tysta och spant uppmärksamma samt spontant tackade med en rungande applåd. Journalisten Maria-Pia Boethius, som skulle hålla nästa föredrag i samma lokal, gjorde flitiga anteckningar. Auditoriet var vid båda tillfällen övervägande ungdomligt.

Båda dagarna sålde Pelle dessutom ett antal ex. av Frits Lindéns "Esperantokurs" och litet småskrifter.

Gunnar Gällmo

## Ĉu vi jam aŭdis ĝin?

*Jen ĉiuj garantiite malnovaj. Ilin mi prenis laŭvorte el "Lingvo Internacia", jarkolektoj 1896 ĝis 1899. Legu, kion la praesperantistoj opiniis amuza:*

### Malfeliĉaj infanoj

Antaŭ kelka tempo sin trovis en ia gazeto sekvanta anonco: "Oni serĉas servantinon, kiu povas kuiri kaj vesti infanojn".

Malfeliĉaj infanoj!

### Interesa legendo

La sekvanta kunparolo, laŭrakonte, ekzistis inter angla vojaĝanto kaj ia maristo trovante sin sur amerika vaporsŝipo:

"Tio estas ja Black Mountain?"

"Jes, sinjoro; la plej alta monto, kiu ekzistas ĉe Lake George."

"Ĉu oni havas ian historion aŭ legendon pri tiu ĉi monto?"

"Jes, oni rakontas, ke amanta paro unufoje surrampis de tiu ĉi flanko sur la pinton de l'monto, sed neniam returnis."

"Ĉu efektive! Nu, kio do fariĝis el ili?"

"Ili iris malsupren sur la alia flanko."

### Konfido

"Avino, ĉu vi havas fortajn dentojn?"

"Ne, mia malgranda amiko, bedaŭrinde mi ne havas eĉ unu denton."

"Estas bone. Volu do kaŝi miajn nuksojn, ĝis mi revenos."

### Logike

– Patro, ĉu l'instruisto povas min puni por io, kion mi ne faris?

– Certe ne, mia filo!

– Nu, mi ne devas fari mian lecionon.

### Amikoj

Patro: –Diru, Karlo, ĉu vi havas multajn amikojn en la lernejo?

Karlo: –Ne, neniun.

Patro: –Nu, kial?

Karlo: –Jen, vidas vi, la knabojn, kiuj min batas, mi ne povas toleri, kaj tiuj, kiujn mi batas, min ne povas toleri.

# Baltiaj Esperanto-tagoj

*La 42-a Baltaj Esperanto-Tagoj (BET) okazis 4-8 de Julio en la urbo Kuressaare sur la insulo Saaremaa (svede:Ösel), Estonio la 4-an de julio ĝis la 8-a.*

Dum kvin tagoj estis aranĝitaj por la partoprenantoj prelegojn, ekskursojn, muzik-kaj amuzprogramojn. La aranĝanto estis la Esperanto-Asocio de Estonio. Precipe oni devas menciiti la sinjorinon Virve Ernits, kiu loĝas en Kuressaare kaj la sinjorinojn Lydia Lindla, Hilja Sarapuu kaj Helju Viires.

La 42-an BET partoprenis 130 esperantistoj, de kiuj la plej multaj venis el Estonio kaj Finnlando. Partoprenis latvoj kaj litvoj, kelkaj poloj, tri svedoj (nur), du germanoj kaj unu brito.

La kongresejo de BET estis gimnazio en Kuressaare. La loko bone taŭgis kiel kongresejo. Ni uzis la grandan aŭlon kaj unu alian ĉambron por Somera Universitato. Libroservo kun multaj interesaj libroj kaj revuoj situis sur la kvara etaĝo, sed espereble ĉiuj partoprenantoj trovis la vojon al ĝi.

Tre bona estis la manĝejo de la gimnazio. Tie ni tagmanĝis bongustajn manĝaĵojn je malalta prezo. La kongresejo situis bele en trankvila strato proksime al kie ni loĝis. Estis

agrabla promeni, ĉar estis bela vetero dum la tuta semajno, eĉ varmega.

La programo de la kongreso komenciĝis la 4-an de julio kun trihora piedekskurso en Kuressaare. Estis tre bone tuj en la komenco de la kongreso konatiĝi kun la urbo. Estas bela kaj malnova urbo, kiu situas ĉe la maro. Ekzemple troviĝas domoj de la sveda epoko dum la deksepa jarcento. La plej impona vidindaĵo estas la malnova kaj bone konservita kastelo. La urbo havas nun 15 000 loĝantojn (plus multaj turistoj somere).

Post la piedekskurso okazis diservo en Esperanto en luterana preĝejo. Komprenoble dum la unua vespero ni kiel kutime interkonatiĝis. La venonta tago komenciĝis per solena malfermo.

La somera universitato estis enprogramita preskaŭ ĉiutage. La prelegoj tuŝis diversajn interesajn temojn. La unuaj prelegoj traktis la situacion en la landoj Estonio, Latvio, Finnlando kaj Svedio. Prelegis Kerstin Rohdin pri Svedio. Ŝi prelegis ankaŭ pri Harold Brown kaj lia verkado. Estis prelegoj pri geologio de Saaremaa, pri kuracado kaj kuraĉlokoj en Estonio kaj pri estonaj naciaj kostumoj. Ni aŭdis ankaŭ pripensindan prelegon

pri spiritismo kaj materialismo de August Kilk.

Amuzis la kongresanojn estona koruso kaj popoldancantoj. La konata kantistino kaj gitarludistino Austra Pumpere el Liepaja, Latvio ĉeestis kune kun grupo de gejunuloj. Ili ludis gitaron kaj kantis en Esperanto kaj en latva lingvo. Dum amuzaj vesperoj oni ankaŭ legis poezion, eĉ poezion verkitan de la laŭtleĝanto mem.

Ni svedoj admiris ke multaj de la kongresanoj kuraĝis kontribui al la amuzaj vesperoj. Estis ankaŭ tempo viziti iujn el la multaj restoracioj en Kuressaare. Povis okazi ke ni svedoj malfrue kune kun aliaj esperantistoj sidis sur la altano de nia hotelo kaj ĝuis la belan vesperon babilante.

La kongresanoj en du busoj traveturis Saaremaa dum tuttaga ekskurso. La pejzaĝo iomete similas al Gotlando kun kampoj (ni vidis malmultajn bovinojn), arboj kaj maro. Montoj ne ekzistas. Ni vizitis du malnovajn bienojn, kiuj nun estas muzeoj. Sed eble la plej interesa travivaĵo dum la ekskurso estis viziti magian lokon kun ronda lago farita de meteorŝtono antaŭ miloj da jaroj. El Saaremaa devenas multaj estonaj verkistoj kaj lingvistoj. Ŝajnas ke la naturo kaj la maro inspiras homon al krea agado.

La Baltaj Esperanto-Tagoj en Kuressaare funkciis tre bone la tutan semajnon certe dank al multe de laboro por prepari ilin. Estis agrable por ni svedoj renkonti geamikojn kaj paroli kun novaj gekonatoj.

La nombro de la kongresanoj estis nek tro nek maltr. La suno brilis la tutan tempon. Ni volas danki la aragintojn pro tre memorindaj kongresaj tagoj. Ni esperas ke al venontaj BET venos pli ol tri svedoj.

**Kerstin Kristoferson kaj Soile Lingman**



La kastelo de Kuressaare.  
Bildo el Vikipedio.

## KALENDARO

I det här numret av La Espero har vi ingen kalender med framtida esperantoarrangemang. I stället rekommenderar vi två nätsidor där ni själva kan se vad som händer. I den första kan man också själv skriva in.  
[http://my.calendars.net/esperanto\\_se](http://my.calendars.net/esperanto_se)  
<http://www.eventoj.hu/kalendar.htm>  
 Pröva dessa två sidor!

# Al Florenco venis 2209 esperantistoj

## ANONCETOJ

### KORESPONDU

Se vi volas havi leter-amikojn en Japanio, skribu al Japano Esperanto-Korespondo-Servo, KLEG, Sonehigasi 1-11-46-204, Toyonaka, JP-561-0802, Japanio. Skribu ne per reto, sed nepre per afrankita letero aŭ poŝtkarto, kaj preslitere viajn nomon, adreson, aĝon, sekson, okupon, interesojn, ktp. Nia servo nepre sendos konfirman karton al via letero.

### ĀRSMÖTE

JARKUNVENO de Esperanto-Gården okazos sabate la 2-an de septembro 2006 en Lesjöfors

### FESTIVALU

La E-klubo en VÄSTERÅS Invitas vin partopreni la 3an Lingvo- & Kulturfestivalon la 14an de oktobro 2006 je la 13.00 – 18.00 en la ĉefbiblioteko de Västerås.

*La Universalaj Kongresoj de Esperanto estas la plej granda ĉiujara manifestacio de la esperantistaro. Ĉi-jare la 91-a UK okazis en Florenco en Italio.*



### Francoj plejmultis

Francoj retenis ĝis la fino la unuan lokon, kiun ĝi okupis en la statistiko de la Florenca UK ekde la komenco de la aliĝado. Surloke enskribiĝis pli da italaj kongresanoj sed ne sufiĉe por detronigi Francion for de la pinta loko. Laŭ la defintiva statistiko al la 91-a UK aliĝis 302 esperantistoj el Francio kontraŭ 279 el Italio. Pli ol cent kongresanojn sendis ankaŭ Japanio (181), Germanio (159) kaj Pollando (129), kaj tiun limon preskaŭ atingis Rusio (97).

La landoj kun pli ol 20 aliĝintoj estas: Brazilo (73), Belgio (72), Hispanio (64), Litovio (58), Usono (49), Britio kaj Nederlando (po 47), Svislando (44), Svedio (43), Hungario (42), Kroatio (41), Danio (40), Ĉeĥio (38), Ĉinio (34), Korea Respubliko (32), Serbio (31), Finnlando kaj Israelo (po 29), Bulgario (27) kaj Kanado (22).

Al la Florenca UK aliĝis entute 2209 kongresanoj el 62 landoj. Rimarkinda estas la relative granda proporcio de aliĝoj el landoj ekster Eŭropo, entute 494 (22,4%).

### Malfermo kun pacpremio

La Universala Kongreso de Esperanto en Florenco estis solene fermita sabate antaŭtagmeze. Kiel kutime, en la solena fermo de la kongreso oni anoncis la ricevantojn de diversaj premioj kaj subvencioj.

La "esperantistan pacpremio", premio Deguchi, kiu valoras proksimume 2.000 eŭrojn, ricevis Simo Milojeviĉ, multjara oficisto de UEA kaj aktivulo de la internacia Esperantomovado.

Premio Deguchi estas monpremio kiu celas regule distingi la plej meritaĵojn kaj projektojn, kiuj "aktivis sur la kampo de la utiligo de Esperanto kiel potenca rimedo por monda paco kaj homara felico, konforme al la idearo de L. L. Zamenhof kaj instruoj de Deguchi Onisaburo".

Aldone la premio celas honori tiujn, kiuj pleje kontribuas al la realigo de la bazaj celoj de Universala Esperanto-Asocio, kies Statuto invitas "kreskigi inter siaj membroj fortikan senton de solidareco, kaj disvolvi ĉe ili la komprenon kaj estimon por aliaj popoloj."

La premio estas nomita laŭ la japano Onisaburo Deguchi. Premio Deguchi estis starigita en la jubilea jaro 1987 per donaco de la religia movado Omoto, kaj pri ĝia ricevanto decidis la estraro de UEA.

La ĉi-jara ricevanto de la premio, Simo Milojeviĉ, naskiĝis en 1936 en Bosnio-Hercegovino. Gimnazion li finis en Zemun (nun parto de Beogrado, ĉefurbo de Serbio) kaj poste studis komparan literaturon en Beogrado, laboris kiel armea oficisto en Zemun kaj poste fariĝis profesia esperantisto. Li estis sekretario de Jugoslavia Esperanto-Ligo, ĉefredaktoro de ĝia gazeto La Suda Stelo, gvidis plurajn kursojn kaj tre aktivis en la Esperanto-societoj en Zemun kaj Beogrado. La Jugoslavia Esperanto Ligo distingis lin per Ordeno por meritoj en 1964.

Kune kun Tibor Sekelj, li estis ankaŭ unu el la pioniroj de la nepala Esperanto-movado: li dum pluraj monatoj instruis esperanton en Katmandu. Nepala Esperanto-Asocio estis akceptita kiel landa asocio de UEA en la vendreda kunsido de la komitato de UEA en Florenco.

En la 1970-aj jaroj Simo Milojeviĉ eklaboris en la Centra Oficejo de UEA. Dum multaj jaroj estis redaktoro de la revuo Esperanto. En 1983 li transprenis la oficon de Generala Direktoro de UEA. Ekde 1996 li plulaboris, ĝis sia emeritiĝo en 2002, kiel libroservisto de la Asocio. Li dum tri jardekoj estis unu el la ĉefaj motoroj de UEA kaj Universalaj Kongresoj.

### Novaj landaj kaj kunlaborantaj asocioj

Ĉi-jare UEA ricevis tri aliĝpetojn de novaj landaj asocioj: de Unuiĝo de Malagasaj Esperantistoj, de Nepala

Esperanto-Asocio, kaj de Asocio de Esperantistoj en Taĝikio. La taĝikia asocio tamen en sia peto ne promesis respekti la statuton de UEA. Tia deklaro estas nepre kondiĉo por ke nova landa asocio povu esti akceptita, sed spite atentigon la taĝikia asocio ne sendis kompletigon, kaj ĝia peto ne povis esti konsiderita ĉi-jare.

La aliĝpetoj de la du aliaj landaj asocioj estis akceptitaj per sekreta baloto, kaj poste Osmo Buller deklaris, ke UEA nun havas 67 aliĝintajn landajn asociojn. Estis aprobitaj ankaŭ la petoj de Rondo Kato kaj la partio Eŭropo Demokratio Esperanto (EDE) pri statuso de kunlaborantaj organizaĵoj.

- Mi estas ne tute trankvila pri kunlabora kontrakto kun politika partio. Se mi estus membro de alia partio, mi eble ne estus tute kontenta. Sed la aliĝpeto plenumas la formalajn kondiĉojn por kulabora kontrakto, diris komitatano Yves Bellefeuille.

Tamen estis respondo. Kunlaboranta organizaĵo laŭ la statuto de UEA ne bezonas esti politike neŭtrala, male ol aliĝinta asocio, sufiĉas ke ĝi respektas la homajn rajtojn.

### Ekskursa tago

En merkredo la Universala Kongreso de Esperanto havis ekskursan tagon, kaj en la kongresejo nenio okazis. La partoprenantoj de la infana kongreseto komune ekskursis al la urbo Pizo, sepdek kilometrojn for de Florenco, kaj fotiĝis antaŭ la kliniĝanta turo. La anoj de la plenkreskula kongreso ĉiu laŭ sia plaĉo ekskursis individue aŭ grupe, ĉu en Florenco aŭ en la ĉirkaŭaĵo.

### Estraro respondas

La kongresaj laboroj rekomenciĝis en ĵaŭdo matene je la 9-a horo per la tradicia programero "Estraro respondas". La tuta estraro de UEA ĉeestis en la plenŝtopita salono Canuto, kie la temperaturo kaj humideco estis ŝvitiĝaj. Ekstere la vetero iom mildiĝis pro kompata pluveto kaj nuboj kiuj iom ŝirmas la kongresanojn kontraŭ la bruliga Florenca suno.

Komence de la kunsido la ĝenerala sekretario kaj estrarano de UEA, Ulla Luin, parolis pri la financoj de la asocio kaj atentigis pri la grava rolo de la Centra Oficejo ankaŭ en la ad-

# el 62 diversaj landoj el la tuta mondo

ministrado de la mon-aferoj.

- Membrotizoj financas proksimume la duonon de niaj elspezoj. Proksimume kvarono el niaj enspezoj venas de la libroservo kaj la kongresaj kotizoj, kaj tio multe dependas de bona prizorgo en la Centra Oficejo. Alia kvarono, proksimume, venas de rentoj aŭ aliaj tiaspecaj fontoj. Tiu mono kompreneble parte venas de iamaj grandaj donacoj, sed la laboro de la Centra Oficejo estas ege grava en la daŭra administrado de tiuj investoj. Ĝenerale mi volus diri, ke la Esperanto-movado estas absolute mirinda, se konsideri, kion ĝi sukcesas fari per tiuj malgrandaj enspezoj, kaj vi kiel membroj estas absolute mirindaj, diris Ulla Luin.

La unuan demandon la prezidanto de la kunsido, Renato Corsetti, akceptis de la konata japana mecenato Etsuo Miyoshi, kiu interalie financis multajn tutpaĝajn anoncojn pri Esperanto en eŭropaj gazetoj.

- Ni jam faris iom grandan investon en Roterdamo, en la Centra Oficejo, sed ĉiuj scias ke la centro de Eŭropa Unio estas en Bruselo. Se ni havus Centran Oficejon en Bruselo, ni povus influi tie. La naskiĝo de EU estas la nura, unua kaj lasta ŝanco por Esperanto, tiel mi kredas. Nia movado estas formiko kiu atakas giganton, sed ni devas ataki.

Renato Corsetti evitis la demandon pri translokado de la Centra Oficejo al Bruselo, kaj volis nuancigi la bildon pri la unuavica graveco de Eŭropo.

- Nia japana amiko estas la plej

konvinkita eŭropisto. Fakte estas ankaŭ multaj eŭropaj estperantistoj, kiuj pensas ke nia ŝanco estas nun aŭ neniam, en Bruselo aŭ en neniu alia loko en la mondo. Mi tamen havas grandajn dubojn. Ankaŭ aliaj mondopartoj fariĝas pli gravaj. La vera problemo de la Esperanto-movado estas, ke ni ne havas tre fortan movadon en Usono. Se ni havus ĝin, certe eĥoj de tio, kion ili dirus atingus la tutan mondon pro la nuna strukturo de la informrimedoj. Ĉiu laboru en sia lando kaj en sia kontinento, kiel se tio estus la plej decida afero por Esperanto. Mi volas nur relativigi la aferon. Bruselo ja estas grava, sed povas esti ke post tridek jaroj Pekino estos eĉ pli grava ol Bruselo, neniu povas scii.

Marcel Delforge, komitatano A por Belgio, demandis pri la agado de UEA en Afriko kaj pri la perturboj post la transloko de la Afrika Oficejo de UEA el Togolando al Benino. Renato Corsetti respondis, ke post la jarŝanĝo la atento de UEA al Afriko prefere kreskis ol malkreskis.

- Afriko certe estas gravega. Ni estas farantaj grandan laboron en afriko. Internacia konferenco de ILEI (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj) okazos en 2008 en Benino. Tio estos speco de antaŭprovo por vidi ĉu Universalaj Kongresoj povos okazi en Afriko, ĉu ekzistas la kondiĉoj por tio. Afriko vere estas kreskanta, unu lastatempa ekzemplo pri tio estas la futbalaj pilkoj senditaj al Burundio por ke povu okazi la futbala matĉo dum la landa kongreso. Ili ĉiuj estas junaj kaj entuziasmaj, tio pri kio aludis Marcel estas denove homaj rilatoj, sed ne ŝanĝas la bazan atenton de UEA al Afriko, eĉ male, ĝi pliiĝas, diris Renato Corsetti.

## Rezolucio

Kiel kutime, ankaŭ la ĉi-jara UK prezentis rezoluciojn. Ĝi legiĝas jene:

La 91-a Universala Kongreso de Esperanto, kunveninta en Florenco (Italujo) kun 2209 partoprenantoj el 62 landoj, konstatinte,

- ke la Jardeko de Edukado por Daŭropova Evoluigo 2005-2014 estas grava kadro por iniciatoj cele al evoluo kiu estu socie dezirinda, ekonomie vivkapabla, kulture taŭga kaj ekologie daŭrigebla;

- ke nuntempe ekzistas gravaj minacoj kaj al biodiverseco kaj al kul-

tura kaj lingva diversecoj, pro la reciproka dependeco inter la homo kaj la naturmedio;

- ke la nuna superrego je monda skalo de unu lingvo havas maltrankviligajn ekonomiajn, sociajn, kaj edukajn efikojn koncerne daŭropovecon, lingvan ekologion kaj la rajton je komunikado;

- ke la strebado de la Esperantomovado al lingva demokratio kongruas kun la valoroj de transnacia edukado celanta informitajn, aktivajn civitanojn, kiuj estu kapablaj kritike kompreni sin mem kaj la ĉirkaŭan mondon por partopreni la evoluprocedon respondece kaj solidare.

Alvokas la Esperanto-komunumon aktive engaĝiĝi en la agadoj kiuj, sur diversaj niveloj, strebas antaŭenigi praktikojn koherajn kun la principoj de la bezonata ŝanĝoprocezo, kaj utiligi siajn lingvon kaj retojn serve al tiuj klopodoj.

Rekomendas al la Estraro de UEA doni al la ĉi-rilataj problemoj pli da atento en estontaj kongresoj kaj agadoj, partnere kun neesperantistaj organizaĵoj.

Konfirmas la pretecon de la Esperanto-komunumo kunlabori kun Unesko kaj aliaj organizaĵoj cele al tutviva edukado por paco, socia justeco kaj kultura diverseco, kaj atentigas ilin pri la lingva aspekto de daŭropova evoluigo.

## Belartaj konkursoj

El la rezultoj de la belartaj konkursoj de UEA, prezentitaj dum UK ni povas mencii ke du svedoj estis premiitaj.

Sten Johansson gajnis la trian premion en la branĉo prozo pro la verko "Tomatoj el Nederlando".

La premion "Infanlibro de la jaro 2005" aljuĝiĝis al: "Arne, la ĉefido" de Leif Nordenstorm (Svedio), eldonita de Kava-Pech (Ĉeĥio).


Informojn pri la aliaj premioj vi oni povos trovi en la repaĝaro de UEA, same kiel pli da informoj pri la kongreso. La informoj tie ĉi ni ĉerpis el

[www.liberafolio.org](http://www.liberafolio.org) kaj  
[www.uea.org](http://www.uea.org)

Bertil Wennergren  
serĉas sed ne trovas  
Plenan Manlibron  
de Esperanta  
Gramatiko en la  
libroservo de UK.  
Fotis: Kalle Kriivilä,  
www.  
liberafolio.org



## Ankoraŭ unu de Astrid Lindgren



**Mio, mia filo.** Astrid Lindgren. Tradukis L. Nordenstorm, (poezion trad.: A. Karkiainen, S. Johansson.) Eldona Societo Esperanto. Gotenburgo. 2006. 143 paĝoj.

Ankoraŭ unu libro de Astrid Lindgren estas tradukita en Esperanton. La nova libro estas "Mio mia filo" eldonita en 2006, la kvina post La Fratoj Leonkoro, Pipi Ŝtrumplonga, Emilo de Smolando kaj Ronja Rabista Filino. Ĝi aperis svedlingve 1954 do naŭ jarojn antaŭ "La Fratoj Leonkoro" en kiu oni vidas plurajn similaĵojn en enhavo kaj stilo.

Per la verko "Mio mia filo" Astrid Lindgren atingis la nivelon de internacie rekonataj fabelverkistoj. Ŝi estas komparata kun la Fratoj Grimm, H C Andersen, Lewis Carroll (Alicia en Mirlando), C S Lewis (Narnia-libroj) k.a.

Bo Wilhelm Olsson, naŭjara knabeto, kiu estas zorgato ĉe paro apud Tegnér-parko en Stokholmo, sidas sola sur benko en tiu parko dum la krepusko falas. Li malgajas, ĉar neniu en la mondo amas lin. Li sentas sin ofendita kaj soleca. Li sopiras al siaj gepatroj, sed la patrino mortis kaj la patro estas laŭdire ĉifonulo. Sed Bo Wilhelm Olsson scias ke lia vera patro estas Reĝo. Li mem malaperas, eniras la landon de fantazio, la landon de fabelo "La Lando Fora".

Tie li renkontas sian patron la reĝon, kiu atendis lin dum naŭ jaroj, kiu amas lin, kiu prenas lian manon. kaj diras: "Mi plej multe ŝatas aŭdi mian filon ridanta en la rozĝardenoj." Neniu faris tiel antaŭe. Man-en-mane

ili promenas en la rozĝardeno de la reĝo. Astrid Lindgren uzas rozajn abunde florantajn en multaj el siaj libroj. En la rozĝardeno de "mia patro la Reĝo" la rozoj esprimas ideon pri beleco, amo kaj soleneco.

Sed la vivo ne nur estas agrabla ĝuo. Mio devas venki la kruelan kavaliron, kiu forrabas infanojn de La Lando Fora. La profunda fonto sub salikoj flustras fabelojn de malnovaj tempoj, rakontas pri la kruelaj eventoj malnovtempaj, serĉas bravan knabon, kiu kapablas rompi la potencon de la malbono, kiu tenas la landon kaptitan per sia ŝtonkoro. Mio ricevas helpon de la naturo en siaj bataloj kontraŭ la Malbono. En la fino li supervenkas la kruelan kavaliron kun la ŝtonigita koro kaj liberigas La Landon Foran.

La tradukisto Leif Nordenstorm transdonas la lingvaĵon de Astrid Lindgren al la leganto tiel proksime al ŝia fabela lingvo, ke vi aŭdas la voĉon de ŝi tiel konatan de programoj en televido kaj radio. Leif trovas bonajn nomojn de la diversaj landoj, ekz "Lando Ekstera", "Lando Fora" kaj li kreas adjektivojn laŭ esperantaj reguloj kun fabela etoso ekz. "pano sagita", "fonto malsoifiga".

"Mio mia filo" estas vere leginda libro ankaŭ aŭ precize por plenkreskuloj. Ĝi temas pri la vojo tra la vivo. Rakontas kiel gaja kaj optimisma la vivo povas esti, sed ankaŭ kiel la homo devas preni sur sin respondecon kaj batali por la justo kaj la bono. Ĝi montas ke ni devas solidarece vivi en la mondo. Eble estas "lernolibro" por hodiaŭ.

Kerstin Rohdin

## Eduko Danĝera

**Eduko danĝera kaj aliaj teatraĵoj.** Harold Brown. Kun eseo de Zofia Banet-Fornolowa. Eldonejo Ulekso, Högsby. Dua eldono 2006. 175 SEK. Havebla ĉe la libroservo de SEF.

Eldonejo Ulekso kolektis dekon da teatraĵoj de Harold Brown subtitole Eduko Danĝera. Renkonti Haroldon private aŭ sursceneje ĉiam kaŭzis enpensiĝon, ĉar li majstris la arton salti de ĉiutagaĵoj al grandaj okazaĵoj. Estis li homarano, kiu same lerte kaj tolereme parolis pri la plej eta estaĵo ĝis gravuloj historie kaj literature.

Legante la teatraĵojn de Harold Brown, oni ne povas ne atenti lian personecon. En la tekstoj li ĉiam ape-

ras kiel vera vivanto. En "Rigardu antaŭ ol salti" oni spuras lian varmkorecon, empation kaj toleremon je homoj kun malfacilaĵoj. La rakonto pliboniĝas pro lia brita milda kaj draŝta bonhumoro. En diskutoj kun Haroldo plaĉis al mi la simpatio kaj toleremo – jes, jes kial ne aŭ jes, tiel oni povas pensi, vi pravas, estas frazoj revenantaj. Interparolante li estis malferma al novaj pensmanieroj ofte aldonante novajn elirojn pensi.

En siaj tekstoj li klare montras sin tre multtalenta – li ne nur estis verkisto sed ankaŭ pentristo, muzikisto, lingvisto, instruisto kun alta scio pri historio kaj literaturo. En la "Jubileo" kunlabore kun Zofia Banet-Fornolowa, li lerte trairas cent jarojn de Esperanto-teatro. Per tiu verkaĵo li aliĝas al la intelekta, kultura elito de Esperanto.

En la grava dramo "Eduko Danĝera" mi klare vidas Haroldon antaŭ mi kiel fervoran humaniston, kiam li priskribas la francan revolucion el vilaĝana perspektivo kaj samtempe avertas je simila pensado en nuna aŭ estonta socio monda.

En "Li enlitiĝas, Li levigas" oni preskaŭ sentas sin invitita al la flava domo de Kerstin kaj Haroldo por ĉekafotable interparoli pri la celo de la vivo. Li ofte okupis sin pri tiaj diskutobjektoj, montrante grandan komprenon al homoj, kiuj volis vivi aŭ pensi alimaniere. Respekton oni sentis al li pro lia humana pensado kaj homa matureco same kiel li traktis sankta decan agadon de aliaj mondanoj.

En "Vagabondo" la ĉefrolulo decidas forlasi sian bonan, sekuran kaj kariere sukcesan vivon por vivi pli simple kaj laŭnature for de konkuro kaj streso. Ĉu Haroldo skribis pri si mem? Li vere havis sperton sur diversaj kampoj – teoria kaj praktika studado, militservo en Afriko, verkado, universitataj studoj pri ekonomio, alta ŝtatoficista servo. Sed li dediĉis sin al kultura agado larĝskale kaj postlasis tre gravan verkadon. Tia homo ĉiam vivas inter ni kaj vivos liaj verkoj.

En la libro entutas 11 teatraĵoj, ne ĉiuj menciitaj ĉi tie, kaj ili ĉiuj legindas kaj mi volas rekomendi legadon, studadon de ĝi en ekz. daŭrigaj kursoj, ĉar la lingvo bonas kaj ne tro komplikas. Krome la enhavo estas tiel varia kaj pensiga, ke ĝi invitas al diskutado en studgrupoj.

Lars Forsman